
# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 8 Aŭgusto, 2012



*Kara Leganto, neatendite venis Aŭgusto, memorante, ke baldaŭ aŭtuno anstataŭigos la someron, ke pasis multaj gravaj eventoj en la loka kaj internacia E-agado kaj E-vivo, inter ili ankaŭ nia tradicia E-pikniko. Al tiuj E-kunvenoj estos dediĉita nia la plej proksima aŭgusta kunsido. Malsupre vi legos interesajn gajajn maj malĝojajn novaĵojn.*

–La Redakcio

## E-Pikniko



Dum la lastaj 6-7 jaroj membroj de la E-societo de Ŝikago regule kolektiĝas ĉiumonate: dek fojojn en la libraro, decembre – por festi Zamenhofan tagon kaj somere – por tradicia pikniko. Ĉi jare, la 22an de Julio piknikumante en la parko Dan Ryan ni festis la 125 datrevenon de nia kara lingvo Esperanto. Pro la netradicia loko kaj ne tre oportuna publika transportado la kvanto de E-ripozintoj ne superis 15. Sed el-sub karba fumo kaj dank' al bier-vina arom-odoro kristaliĝis la ideo de Tutusona E-kongreso en glora urbo Ĉikago (prononcu ŝikagoŭ). Plej probable, la ideo kondensiĝos oktobre, kiam la unuan fojon kunsidos kreanta organiza komitato. Espereble, la ideo estos pli sukcesa ol Olimpiaj ludoj de 2016 en la plej granda urbo de kontinenta Usono. Bonŝancon!


*–Araneo*

## Nova ESF-filio

ESF fondas plen-proprietan filion por mastrumi la daŭran disvolvadon de projektoj kiel lernu.net, la bone konata multlingva retejo por lerni Esperanton. En Montrealo, Kanado, dum sia jara strategia sesio, la ESF-estraro nomumis Erin Piateski kiel fondan ĝeneralan direktoron de la nova kompanio, kiu estos registrita en Vaŝingtono, Usono, sub la nomo ESF-enrete. "Nia celo estas igi la diversajn retprojektojn finance memstaraj, kaj samtempe certigi ke tiuj projektoj ne ekdominos la tutan prioritataron de la Fondaĵo," diris ESF-prezidanto Mark Fettes. "La evoluo de Lernu ege kuraĝigas nin, kaj ni daŭre konstruos sur ĝia sukceso. Dum la pasintaj kelkaj jaroj Erin grave rolas en la strategia planado de niaj retprojektoj, kaj ni ĝojas bonvenigi ŝin en ĉi tiun novan rolon." Mekanika inĝeniero diplomita de MIT (Masaĉuseca Instituto de Teknologio en Kembriĝo, Masaĉuseco, Usono), Piateski estas aktive engaĝita kun Lernu jam de antaŭ ties lanĉo en 2002. Kiel ĝenerala direktoro ŝi proksime kunlaboros kun aliaj membroj de la kerna mastruma teamo de la retejo. Ŝiaj prioritatoj inkluzivas strategian planadon, kreadon de partnerecoj kun individuoj kaj organizoj, kaj mastrumadon de la centoj da volontuloj de la retejo. "Lernu jam estas la plej granda enreta komunumo de Esperanto-parolantoj kaj Esperanto-lernantoj," rimarkis Piateski. "ESF ludis esencan rolon en la disvolvado de la retejo, kaj ni antaŭĝuas ampleksigi ĉi tiun rilaton per ESF-enrete. Laŭ ni, la projekto estas en unika pozicio stimuli kunlaboron inter Esperanto-parolantoj tutmonde kaj plivideblig Esperanton ĉe la ĝenerala publiko." Lanĉo de la nova retejo estas planata por proksimume koincidi kun la deka datreveno de Lernu fine de 2012 aŭ komence de 2013.

*–ESF*

## Forpasis Harry Harrison (1925-2012)




La 15-an de Aŭgusto ĉesis bati la verda koro de Harry Maxwell Harrison – verkisto, klasikulo de sciencfikcia literaturo, pacifisto, Esperantisto, honora prezidanto de EA de Irlando, membro de Esperanto-USA, honora patrono de UEA.

Harrison en multaj siaj noveloj roligis Esperanton kiel lingvo de estontaj societoj kaj aperigis specimenojn el ĝi. Foje tiuj specimenoj estas iom strangaj, kaj ne ĉiam estas klare, ĉu tio montru ŝanĝiĝon aŭ dialektiĝon de Esperanto dum jarmiloj? Li edukis legantojn, amuzigis ilin, restante serioza verkisto.

Tri liaj noveloj estis esperantigitaj (1994, 1996, 2001).

# ❖Septembre❖

Septembre ni pridiskutos terminojn (vd sube), proponataj por Suplemento de NPIV de nia membro. Bv prepari viajn opiniojn, komentojn. Vi povas sendi ilin al la redakcio ankaŭ rete. Dankon.

1. Anabiozo – akra malaktiviĝo de organismaj funkcioj kun la kapablo poste, en favoraj kondiĉoj, restaŭri sian funkciadon.
2. Babuinoj – simia genro.
3. Bestsellero – libro tre aĉetata, kun granda eldon-kvanto.
4. Fonogramo – son-enskribo de plena muzikaĵo, aŭ de muzika akompano por kantistoj.
5. Halso – ŝanĝata direkto de ŝipa moviĝo (NPIV traktas ĉi terminon aliel).
6. Ĵen-ŝenj – orienta (ĉinia) kuracebla radiko, antaŭe tre valora.
7. Konferansisto – artisto, kiu anoncas programerojn kaj amuzas spektantojn.
8. Librarejo – (en NPIV traktita parte), nepre devas esti anstataŭ «biblioteko».
9. «Lignofajro» estas unu el specoj. Nepras universala termino por ajna utila, eksterhejma fajro: ĉu ligna, folia, balaaĵa..., ĉu bivakofajro aŭ tendara fajro (ekz. en la rusa «kostjor»).
10. Memuaro(j) – ne plene traktata de NPIV. M. signifas ankaŭ verko pri rememoroj.
11. Mentala, mentaleco – spirita farto.
12. Noosfero – Konscia kaj nekonscia homara agado, influantaj biosferon de l' Ter'. La fenomenon determinis akademianoj: V. Vernadskij kaj I. Jefremov (Rusio). Vidu la terminon *Noosphere en Websters Dictionary* kaj en diverslandaj enciklopedioj.
13. Pandemio – tre larĝe disvastiĝanta epidemio, precipe antaŭe: ĥolero, pesto, variolo.
14. Partner-urboj – («ĝemel-urboj» – termino tre stulta).
15. Pelengi – determini lokiĝon de objekto per radio-ondoj. Pelengilo.
16. Perlustri – cenzur-kontroli privatan korespondadon.
17. Primatoj – supera ordo de mamuloj: duon-simioj, simioj, antropoidoj, homoj.
18. Rangîro – soldatoj, sportistoj ktp, starigataj en spaliron laŭ ilia staturo.
19. Reinkarnado – renaskiĝo (hipoteze).
20. Respiratoro – masko, protektanta kontraŭ polvo kaj fumo.
21. Sendependeco – (manko de NPIV, rimarkita de s-ro Johano Rapley, Francio).
22. Stejto(j), ekz. Usonaj – estas administraj partoj de l' ŝtato.
23. Tamadao – persono, kiu gvidas kaj amuzas festenon, ekz. nupton.
24. Teknogena (katastrofo) – kaŭzita de granda teknika averio, ekz. Ĉornobila.
25. Vaterlinio (akvolinio). Linio laŭlonge de ŝipo, montranta la permesatan droniĝon.

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Aŭgusto – EEU, E-USA, UK k IJK kongresoj

25an de Septembro – traduk-seminario (gvidas Gregoro k Viktoro)